



NORDHUNGARIA INFORMO

*Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc*

Januaro – Februaro - Marto 2011-a

6a jarkolekto nro 65-67

Enhavo

Kalendaroj de popoloj	3
Pri kiuj ni skribos en 2011?	5
Jaroj pri Kalvin 2009-2014	6
Memorjaro pri Ferenc Liszt	7
Ferenc Liszt (1811-1886)	8
La unua hungara prezidanteco de la Eŭropa Unio en 2011	9
10-jara estas la Vikipedio	11
Mondotago de la Amikeco	12
Sinjorino Adri Pásztor	12
Semajno de Internacia Amikeco	12
/http://uea.org/informado/sia.html pri Facebook, Osmo Buller/	13
Anonco el Udmurtio	13
„Бронислав Чупин; 26. Februaro	13
La 8-a de Marto; Virina Tago en Hirosima	13
La 32-a TUTPOLANDA ESPERANTO KONGRESO	14
Saĝa diro	14
Atenton!	14
2011 estas Jaro de Leporo, laŭ la ĉina horoskopo	16
Niaj birdo-gastoj	16
Kial estas avantaĝa superi la 45. jaraĝon?	17
Enigmoj	18
Meritas por rideti!	18
Muzika literatura vagado	19
11 esperantistoj reprezentas UEA-n ĉe Unuiĝintaj Nacioj	19
Funebroj	20
Rerigardo al la pasintjara Zamenhofa Tago	22
Letero al d-ro L. L. Zamenhof	23
Transtempa respondletero de L.L. Zamenhof al la geedzoj Pásztor	23
Danko	24
El nia leterkesto	26
La Mono De Ĉielo	27
Odo pri SKOKOVY	30
Hungaraj historiaj datrevenoj en 2011	34
: Recenzo:	35

Kalendaroj de popoloj

Ekzistas tiuj kulturoj, ĉe kiuj daŭre ŝanĝiĝas komenco de la jaro, komparite al nia kalendaro. Kial ne estas unueca ĉie la jarkomenca dato? Kial festas aliam la Ĉinoj, Judoj, Mohametanoj la komencon de la jaro? Determina estas pri la socio, ke kiun tempopunkton elektis kiel la komenco de la jaro. La kalkulado de la kalendara jaro baziĝas laŭ la astronomiaj faktoroj, sed komencoj de tago, monato, jaro kaj bazo de ĝiaj kalkuladoj dependas de ecoj, tradicioj de la kulturo. Ĉiuj kulturoj, kiuj rekonas ŝanĝojn de la sezonoj kaj priatentas tempopunktojn de la solsticoj, elektas tian tempopunkton, kiam la ciklo komenciĝas.

1. **En la islama religia kalendaro** la unua monato de la jaro estas la Ramadano. Ĉar la islama religio volas nur lunkalendaron, pro tio la festoj ne ligiĝas al la sola-ciklo. Pro tio la nova jaro ĉiam sekvas la antaŭan post 12 lunmonatoj.

2. **En Meza- kaj Okcidenta Eŭropo** sama estis la jarkomenco de naskiĝo de Jesuo. Ĝian memoron gardas al la epifanio /6. januaro/ ligita novjaro, ĉar en la tria jarcento oni festis la 6-an de januaro alvenon de Jesueto. 25-a de decembro, naskiĝtago de la Mesio disvastiĝis nur de la kvara jarcento, je romia efiko. Ekde tio la epifanio iĝis memortago de bapto de la Sinjoro kaj la Kristnasko unuigis en si mem al la vintra solstrico ligitajn kutimojn de la paganepokaj popoloj, pro tio iĝis komenca tago de la jaro. De la 11. jarcento oni uzis ankaŭ en Hungario kaj en religia ofica vivo. Ĉi tio okazis ankaŭ en la 16. jc., spite de tio, ke de la 1400-aj jaroj ĉiam pli kaj pli ofta estas la jarkomenco la 1-an de januaro.

3. **La ĉina novjaro**, aŭ lun-novjaro /ĉinlingve: Chunjie, „festo de printempo“/ estas la plej grava festo de la jaro por unukvarono de loĝantaro de la mondo. Tempe de tio kaj en Ĉinio kaj en diversaj lokoj de la mondo en la ĉinaj kolonioj dum tagoj ĉesas la labortagoj, ĉiuj okupiĝas pri la novjaro kaj ĉesas ankaŭ la komerca trafiko. Ĉi tiel okazas ankaŭ en Hungario, kie la ĉi tie vivantaj Ĉinoj – se ili ne sukcesas hejmeniri – klopodas festi la famajn tagojn, kvazaŭ estintus hejme. Tempopunkto de la festo de printempo – same al nia Pasko – ŝanĝas de jaro al jaro kaj nur malmulte da Ĉinoj scias, kiel ili devas kalkuli ĉi tiun tempopunkton. Komencon de la novjaro ili kalkulas malsimple. Sed tio estas vera pleje, ke la festo de la printempo estas laŭ la eŭropa kalendaro tage de la al 4-a de februaro plej proksima novluno. Pro tio ĉi festo de printempo estas ĉiam inter la 21-a de januaro kaj 21-a de februaro. La Ĉinoj scias laŭ la oficialaj kalendaroj, ke dum la nuna jaro kiam ili festas sian plej faman feston. Nuntempe ili kalkulas tempon de la festoj laŭ tiu jaro, kiu komenciĝas post la vintra solstico ĉe la dua novluno. / vidu artikolon de angla vikipedio laŭ la ĉinia kalendaro/

4. **La hebrea aŭ juda kalendaro** estas la tradicia-antikva kalendaro de la judoj. Ĝi celas sekvi la Lunon precize kaj la sunajn jarojn ĝenerale, por determini la tagojn de la judaj festoj, la datojn de memor-ceremonioj por forpasintoj ktp. La unua tago de la hebrea jaro (novjara tago) nomiĝas hebree Roŝ Haŝana (komenco/kapo de la jaro).

Jen; la tempokalkulo de la venontaj hebreaj novjariĝoj, kun mencio de la Gregoria kalendaro:

5771: 8-10 septembro 2010
5772: 28-30 septembro 2011
5773: 16-18 septembro 2012
5774: 4-6 septembro 2013
5775: 24-26 septembro 2014 /Laŭ Josef Shemer/

5. **Laŭ la persa tempokalkulo** la unua tago de la monato ferverdin estas la novjaro. En Iran ankaŭ nun ĉi tiu tago /21. marto/ estas komenco de la jaro.

6. **En Tajlando laŭ budhista tempokalkulo** oni kalkulas la jarojn, do, komparante al la Gregorio kalendaro, ili antaŭas nin 543 jarojn. La tajlanda tradicia, aŭ seshora horloĝo estas tradicia tempomezura sistemo, kiun oni uzas ankaŭ apud la oficiala 24 hora tagordo.

7. **Printempa solstico**

Preskaŭ ĉiuj kulturoj baziĝas laŭ la printempa ekvinokso, ja ĉi tiu periodo signifas la printempon, renoviĝon de la naturo, komencon de la agrikulturaj laboroj. En Babilonio oni komencis la jaron a. K. dum 2. jarmilo, printempo. En la antikva epoko Romo la 15-an de marto komenciĝis la konsula jaro. Multnombra agrikulturo, same kiel la hungara kamparanaro gardis la memoron de la printempa jarkomenco, ni pripensu nur niajn paskajn popolkutimojn. En la mezepoka Francio la jaro komenciĝis delonge dum la Pasko. Nuntempe nur la en 1957 enkondukita unueca hinduja kalendaro alkroĉiĝas al la printempa ekvinokso, kiel la jarkomenca dato. Ilia Gregorio-kalendaro kalkulas la novjaron de 22-a de marto.

8. **Aŭtuna ekvinokso**

La aŭtuno estas tempoperiodo de la forpaso, tamen multnombra civilizacio dum tio ĉi komencis la jaron. Ĉe multaj nordamerikaj indianaj triboj por la vintro kolektigitaj stokoj determinis tion, kiel oni povas transsuferi la vintron, pro tio ili elektis la aŭtunan ekvinokson, tempon de la rikolto kiel komencon de la jaro. Ankaŭ en la praa Japanio oni komencis la jaron aŭtune, purigis la domon, ĉesis la daŭrajn aferojn kaj forpelis la diablojn de la malnova jaro. La Judoj la 1-an de monato Tisri /septembro-oktobro/ festas la novan jaron, komencon de la novlunjaro. Dum tio ili klopodas akiri tutan animan renoviĝon kaj penton.

9. **Somero, aŭ vintro**

La somera kaj vintra solsticoj pli malofte iĝis jarkomenca festo. Ilia signifo iĝis universala, kiam la Juliano kaj Gregorio-kalendaroj disvastiĝis. Ĉe tiuj popoloj, kiuj adoris la Sunon kiel Dion, al du tempopunktoj ligiĝis renaskiĝo de la Suno-Dio. En Romo oni festis la 25-an de decembro la feston de la malvenkebla Suno kaj naskiĝtagon de Mithras, persadevena Suno-

Dio. Popolkutimoj de la du solsticoj montras eksterordinale multe da similecoj, kiujn ni gardas ankaŭ nun en tradicio de la fajrobruligo, aŭ en kandeloj de la kristnaskarbo. La fajro, arkaika formo de la adoro de Dio restis plu ĉe la St-a Ivano-taga transsalto de fajro kaj ĉe la kristnaska ŝtipobruligado.

Nian tekston ni pretigis laŭ artikoloj de hungara Vikipedio pri Jarkomenco, pri Kalendaroj de popoloj, sed vi povas legi pri tiu temo ankaŭ el la Esperanto-Vikipedio:

eo.wikipedia.org/wiki/Kalendaro

Feliĉan Novan Jaron por ĉiulandaj esperantistoj!

/Tekston de sinjorino Adri Pásztor, esperantigis László Pásztor/

Pri kiuj ni skribos en 2011?


Ĉi tiu jaro estos jaro de multĉio, ni devas rememori pri multaj gravaj aferoj. Inter aliaj, ekzemple pri la temoj:

Jaro de baroko okazos en Gödöllő, Internacia tago de la arbaroj, Jaro de granda paruo, Jaro de memvoleco en Eŭropo, Jaro de lingvo kaj kulturo de Livonio, Jaro de kantistinoj, Jaro de la hungaria glaciĥokeo, Jaro de la sanoturismo en Hungario, Jaro de Ferenc Liszt /200. datreveno de lia naskiĝo/, Jaro de Venuso, Jaro de la instruado, Jaro de leporo /laŭ ĉina horoskopo/, Jaro de grekaj dioj, Internacia jaro de ĥemio, Jaroj de Tallin kaj Turku... /laŭ Google/.

Pri la menciitoj inter aliaj interesaĵoj ni skribos sur paĝoj de nia revuo.

Adri Pásztor

Jaroj pri Kalvin 2009-2014



Johano Kalvin laŭ la hungara Vikipedio

Reprezentanta figuro de la reformacio estas Johano Kalvin. Unu el la pli gravaj konsekvencoj de la reformacio estas renovigo de la eklezio, nome por remeti sur bazon de la Biblio. La gepatra lingva diservo realiĝis en la protestantaj eklezioj. La ceremonioj simpliĝis. Centro de la diservo iĝis la prediko /vortanonco/. Oni tradukis la Biblion al gepatra lingvo /1590. Károli Gaŝparo, pastro de Gönc, en Vizsoly estis presite, pro tio oni nomis al „Biblio de Vizsoly” kaj oni verkis multnombrajn ekleziajn librojn./La literaturo povas danki multĉion al la reformacio. Publikkonate estas, ke la reformacio kontribuis por evoluigi la hungaran lingvon al literatura lingvo. Johano Apáczai Csere /1625-1659/ instruisto de reformata kolegio de Gyulafehérvár kaj Kolozsvár, ankoraŭ en Nederlando dum siaj studoj de Utrecht presis Enciklopedion de Albert Szenczi Molnár /1574-1634/. Liaj latina-hungara vortaro kaj la hungara gramatiko enhavis bazojn de la bela hungara parolo kaj ortografio. Liaj el psalmoj faritaj tradukaĵoj ĝis nun eksonas en niaj temploj. La reformacio ne volis meti la sciencojn sub kontrolon de la eklezio. Eĉ Kalvin instruis tion, ke precizaj konoj de la sciencistoj kaj teknika scio de la metiistoj estas ĝeneralaj donacoj de Dioj. Johannes Honterus, ekiriganto de reformacio de Transilvanio faris elstaran sciencan agadon en kadro de teologio, juro kaj geografio. La plej gravaj bastionoj de la hungara reformata kulturo estis dum jarcentoj la famaj kolegioj. /Debrecen, Sárospatak, Pápa, Kecskemét, Nagyváradi, Nagyenyed, Kolozsvár, Marosvásárhely./ En tiuj edukiĝis Lajos Kossuth, eminenta figuro de la nacia liberala politiko de la 19-a jarcento, Sándor Petőfi, ardanimula poeto de la 1848-a revolucio, Mór Jókai, nia plej legata prozisto kaj Endre Ady; renoviganto de la moderna hungara poeta lingvo. Ĉi tiuj kolegioj instruis dum jarcentoj ankaŭ pastrojn, teologojn de la reformata eklezio, kiuj de la peregrinacio /vizito de okcidenta universitato/ flegis daŭrajn kontaktojn kun fontoregionoj de

la eŭropa reformacio/ Wittenberg, Genf, Heidelberg, Oxford/. Konsekvence de situacio de la hungara reformacio, iĝis dum jarcentoj ankaŭ gardanto de penso de la hungara sendependeco kontraŭ la katolika Vieno. Ne estas hazarde, ke en 1849 Debrecen iĝis ĉefurbo de Hungario, eĉ oni deklaris en preĝoĉambro de reformata kolegio de la urbo detronigon de domo de Habsburgo. La plej grava eco de la hungara reformata pensado estas la severa bibliocizmo, sed apud ĝi tiu alkroĉiĝis ĉiam kaj ankaŭ nun al la lernejo kiel misiaj iloj kaj karakterizis la patrujamo.

Interpretante la Kalvin-jarojn László Köntös akcentis, ke irante sur vojoj de Kalvin ni devas koncepti denove mesaĝon de la kristanaro.

La jaroj de Kalvin por la hungaraj reformatoj ĝis jaro 2014, ĝis 450, datreveno de morto de Kalvin kreas multe da eblecoj.

/Fonto: Arad-Mosótz: Kion la mondo povas danki al la reformacio. Sándor Komádi, Arad-Mosótz: ĉefkuratoro – retpaĝo de la Reformata paroĥo – La hungarlingve kompilitan tekston de Adri Pásztor, esperantigis László Pásztor/

Johano Kalvin en Miskolc

Memoron de Johano Kalvin, en urbo Miskolc gardas la publikarea prinomo de Kálvin-köz (Kalvin-strateto), kie situas la Kalvinana Gimnazio „József Lévy” kaj ĝia Kolegio. Tie oni laŭtradicie okupiĝas pri flegado de memoro de Johano Kalvin.

Adri Pásztor

Memorjaro pri Ferenc Liszt



Ferenc Liszt en 1847, pentraĵo de Miklós Barabás (1818-1898)
http://hu.wikipedia.org/wiki/Barabás_Miklós

Se ni aŭdas pri Ferenc Liszt, tiam ni pensas pri portreto de Ferenc Liszt de Miklós Barabás kaj pri poemo de Mihály Vörösmarty, titolita: „Al Liszt Ferenc”.

Ferenc Liszt (1811-1886)

Infano de Adam Liszt kaj la aŭstra Maria Anna Lager naskiĝis en 1811 en la aŭstra Doborján, kie lia patro servis en bieno de familio-Esterházy. La gepatroj tre ege atenteme edukigis, instruigis sian fileton. La unuan pianlecionon li ricevis de sia patro, kiu ludis plurajn instrumentojn kaj iam estis violonĉelisto en orkestro de Kismarton.

La talenta filo dum siaj koncertoj de Sopron kaj Pozsony ankoraŭ ne estis dek jaraĝa, sed decidita estis antaŭ la publiko kaj lia belega pianludo havis grandan sukceson. Pro tio la hungaraj ĉefnobluloj donis stipendion al li por pluaj muzikaj studoj. Kun sia patro li iris al Vieno en 1822, kie li lernis ĉe Carl Czerny kaj Antonio Salieri. Ĉe tiuj majstroj lia muzika evoluo estis certigite. Al la rolado alkutimiĝinta infano koncertis ankaŭ en Vieno.

En 1823, en majo li estis unue antaŭ publiko de Peŝto. Aŭtune en la de Luigi Cherubini direktorita Konservatorio de Parizo private daŭris siajn studojn. Inter aliaj Ferdinando Paer instruis komponadon al la juna Liszt. La franca ĉefurbo kun la vigla kultura vivo impresis pluan vivon kaj evoluon de Liszt. En Parizo konatiĝis kun Chopin. Li alproprigis de Chopin nuancojn de la pianludo. De Berlioz li ellernis la orkestran lingvon kaj novajn akiraĵojn de la programmuziko. Li koncertis en pluraj eŭropaj landoj kaj fascinis sian publikon de sia virtuoza ludo.

Lia patro mortis en 1827, poste la patrino transloĝiĝis al Parizo. En tiu tempo la talenta junulo donis pianlecionojn ĉe aristokrataj familioj kaj legis multe. Ankaŭ lia unua hungara komponaĵo prepariĝis: li komponis variojn, ties bazoj estis soldatvarbaj melodioj de János Bihari kaj László Fáy. Eminentuloj de muzikvivo de tiu epoko (ekz. inter aliaj Niccolò Paganini, Hector Berlioz, Mendelssohn, Bartholdy) impresis lian artan evoluon.

Ankaŭ lia privata vivo estis transformanta. Kune kun Marie D'Agoult li transloĝiĝis al Svisio. Ili havis tri infanojn. Liszt multfoje ĝis monato ne vidis sian familion pro sia koncertoturneo. La sukcesaj koncertoj akiris por li famon, de Parizo al Vieno, de Milano al Peŝto. Li havis humanajn manifestadojn, kies belaj ekzemploj estas, ke li donacis al orgeno de preĝejo de Doborján kaj donacis al la dum granda inundo de Peŝto damaĝintaj malriĉuloj kaj al estigo de la Nacia Muziklernejo.

Intertempe li prezentis sin kiel dirigento. Post la varia, vigla vivo li estis dirigento en Weimar. Tiutempe li havis multan tempon por komponadi. Lia amikeco kun Richard Wagner profunde impresis lin. Dume li konatiĝis kun princino Sayn-Wittgenstein. Ilia kontakto profundigis kaj li sekvis la sinjorinon al Romo, kie ĉefe ekleziajn muzikojn (ekz. oratoriojn) komponis. Enirante al pli malmultaj ordenoj li transloĝiĝis al Vatikano. Li penadis por reformi la eklezian muzikon. El inter la tiutempe komponitaj gravaj komponaĵoj, la legendon de Sankta Elizabeta li direktis en Peŝto, kie ankaŭ liaj hungaraj kontaktoj reviviĝis.

Laŭ propono de grandprincino Sándor Károly li reiris al Weimar. Poste li multfoje veturis inter Romo, Weimar kaj Peŝt. Dum iu veturo li malvarmumis kaj pro pneŭmonito mortis. Liajn postrestaĵojn oni portis en 2002 en la Nacian Tomboĝardenon, inter festaj solenaĵoj.

Etoson de tiu epoko prezentas ankaŭ la ekspozicio „Ferenc Erkel, direktoro de Muzikakademio” en la „Memormuzeo Ferenc Liszt, ĝis la 15-a de marto 2011, kie legante instruistajn notojn, korespondadojn, horarojn, iĝos por la vizitantoj vera travivaĵo la unua jardeko de vivo de la Muzikakademio.

[/www.lisztzeneiskola.hu/liszt_eletrajz.htm/](http://www.lisztzeneiskola.hu/liszt_eletrajz.htm/)

Premiero de Don Sanche: opero de Ferenc Liszt, estos vere rara malkovro en Miskolc dum la „Bartók-Verdi 2011” Miskolca-Internacia Operfestivalo – skribis en sia n-ro 9. oktobro 2010-a, la Nordbayerischer Kurier, kiu anoncon donis pri la sinprezentoj de la kune kun laborantaj teamoj de Miskolc kaj Bayreuth partoprenantaj en la scenejonstarigo de la opero. /Hungarlingve vidu: www.operafesztival.hu/index.php?...liszt/ Famon de Ferenc Liszt gardas en Miskolc; la Miskolca Instituto de Instruistojn Eduka Muzikarta Ĉeflernejo Ferenc Liszt,

kaj lian memoron gardas ankaŭ stratonomo. En 2011, okaze de la 200-a datreveno de naskiĝo de Ferenc Liszt, la artamika publiko rememoras pri la granda figuro de la hungara muzikarto.

/Hungarlingvan tekston de s-rino Adri Pásztor, esperantigis László Pásztor/

La unua hungara prezidanteco de la Eŭropa Unio en 2011

Vespere la 6-an de januaro 2011 Hungario transprenis de Belgio la sekvantan EU prezidadon. La granda ceremonio okazis en la kupolhalo de la Parlamentejo kun la partoprenoj de Yves Leterme belga kaj Viktor Orbán hungara ĉefministroj.

Ĉeestis la prezidento de la Hungara Respubliko, ĉiuj ministroj, prezidantoj de la parlamentaj partioj kaj la tuta Budapeŝta diplomataro.

/Fonto: www.eu2011.hu - Aŭtoro: András Kovács/



Belgio transdonis la prezidadan standardon al Hungario

Hungario bone prepariĝis por la prezidado

Hungario bone prepariĝis por la sekvanta EU- prezidado – diris la 7-an de januaro 2011 Viktor Orbán hungara ĉefministro kaj José Manuel Barroso, prezidanto de la EU-Komisiono. La du gvidantoj partprenis komunan gazetaran konferencon okaze de la komuna kunsido de la Komisiono kaj la hungara registaro.....

/Fonto: www.eu2011.hu / Aŭtoro: András Kovács/Permesite de s-ro László Gados, pri lia hejmpaĝo/

Datrevenoj



Statuo de Erasmo en Rotterdam

http://europa.eu/pol/educ/index_hu.htm

Ĉi-jare pasas **500 jaroj** de post la apero de Laŭdo de l'stulteco, per kiu la granda pensulo Erasmo de Roterdamo (1466-1536) en satira formo atakis ĉiajn antaŭjuĝojn kaj superstiĉojn. "Erasmo estas la plej granda filo de Roterdamo, sed antaŭ ĉio li estas la plej elstara figuro en la tuta historio de humanismo kaj ĝuste tial ni esperantistoj devas lin koni", skribis la recenzanto de la Esperanta traduko de lia ĉefverko en la revuo Esperanto. Sekve la 34-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA omaĝos la Erasmo-jubileon per du prelegoj. D-ino Věra Barandovská-Frank faros ĝeneralan enkondukon al la vivo kaj verkaro de Erasmo, kaj Gerrit Berveling prelegos pri Laŭdo de l'stulteco, kiun li esperantigis el la latina originalo. La traduko aperis en 1988 okaze de la 73-a UK en Roterdamo.

La 34-a Malferma Tago okazos sabaton, la 14-an de majo. Krom la du prelegoj pri Erasmo kaj lia klasikaĵo, en la programo estos ankaŭ aliaj prelegoj, libroprezentoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo. /Gazetaraj Komunikoj de UEA – HEA/

Antaŭ 450 jaroj fondiĝis la nuna Miŝkolca Reformata Gimnazio József Lévy, en kies ornamĉambrego la Lernejhistoria Ekspozicio inaŭgurita estis la 17-an de Februaro 2011-a. Sed ankaŭ en la Miŝkolca Muzeo „Herman Ottó” (Mŝkolco, strato Papszer) rigardebla estas ekspozicio pri la antaŭ 450 jaroj fondita „Oŝkola” (Iŝkola=Lernejo), funkcia komence en ties konstruaĵo.

Adri Pásztor

Antaŭ 120 jaroj okazis

D-ro Kálmán Kalocsay, kuracistprofesoro naskiĝis en 1891, kiu estis kaj hungare kaj esperante verkanta poeto, verkisto, tradukartisto, lingvisto.

Samjare naskiĝis ankaŭ Julio Baghy - la alia fama elstara hungara figuro de Esperanto-mondliteraturo - kiu estis aktoro, reĝisoro kaj ankaŭ esperante verkanta poeto. Ambaŭ du elstaruloj ligiĝis al Miskolc. Ilia memoro estu benata!

Vi povas legi pri d-ro Kálmán Kalocsay; ĉe:

<http://eo.wikipedia.org/wiki/Kalocsay>

Vi povas legi pri Julio Baghy ĉe:

http://eo.wikipedia.org/wiki/Julio_Baghy

Antaŭ 50 jaroj okazis

Antaŭ 50 jaroj forpasis Ludoviko Király, nomdonanto de nia Miskolca Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”. Ripozu pace!

Antaŭ 20 jaroj okazis

„La publikutil-stata Esperanto – Fondaĵo en Hungarujo (Budapeŝto) estiĝis en 1991. Ĝiaj celoj estas por helpi la disvastigon de lingvo Esperanto, subtenoj de ĝia instruado, apliko, estigo de la aplikaj eblecoj, kaj financaj helpodonoj al kreo de novaj kulturaj produktaĵoj.” /Szilvási/ Gratuloj al la ĝis nun atingitaj rezultoj de la bone funkcia Esperanto Fondaĵo de Hungarujo, kaj al ĝia plia agado ni deziras multan sukceson.

10-jara estas la Vikipedio

Ekde januaro 2001-a ekzistas la Vikipedio. Kiel Esperanto havas sian Zamenhof, tiel Vikipedio havas sian Jimmy Wales. La vorto Vikipedio devenas kaj de Enciklopedio kaj de la havaja vorto viki-viki, „rapida”. (Ziki van Dijk: VIKIPEDIO por vi)

Nuntempe la plej granda Enciklopedio de la Mondo, enhavas pli ol 3,5 milionojn da vort-artikoloj en pli ol 120 lingvoj. Originale oni kreis ĝin nur por la angla lingvo, sed nun ankaŭ multaj aliaj lingvoj rolas tie, inter ili estas la Ido, la Esperanto kaj ankaŭ la Volapuko.

„Nur tri tagojn post la 10-jara jubileo de la tuta Vikipedio-projekto (en la 15-a de januaro), la Esperanto-Vikipedio atingis 140.000 artikolojn, vespere de la 18-a. Nuntempe "nia" versio de la vaste konata internacia projekto enhavas sume pli ol 30 milionojn da vortoj - Ĝi estas simile granda kiel multvolumaj paperaj enciklopedioj. Ĝi aktuale okupas laŭ la nombro de artikoloj la 26-an lokon kompare kun alilingvaj versioj de Vikipedio. Por kunlabori per la Eo-Vikipedio: <http://eo.wikipedia.org/wiki/Portalo:Komunumo>

Por legi pli ==>

<http://www.liberafolio.org/2011/jam-pli-ol-140-000-artikoloj-en-la-esperanta-vikipedio>

Ĉiuj rajtas pluuzi la koncernan artikolon por iu ajn celo, sed oni devas indiki la devenon de la verko (ankaŭ la retadreson kaj la aŭtoron, aŭtorojn, se tiuj menciitaj estas).

Adri Pásztor

Nome de la Miŝkolca Esperanto-Amika Rondo „Király Lajos”: mi gratulas la kune agantajn laborantojn de la Vikipedio, kaj deziras plian sukcesan funkciadon: László Pásztor

Antaŭ unu jaro mortis d-ro Ferenc Jáki – Paco estu kun li. Estu benata!

/Hungarlingvan tekston de Adri Pásztor esperantigis László Pásztor/

Mondotago de la Amikeco

„La amikoj ridetigas vin, kaj kuraĝon vekas en vi por akiri sukcesojn, aŭskultas prilaŭdas vin kaj ĉiam malfermitaj estas al vi. (Oscar Wilde) – skribis mia retamikino Maria Ballán, poste daŭrigis: „Sciindas, ke la amiko estas ĉiam tie, kie la helpo necesas...” Mi scias ankaŭ tion, ke amikeco estiĝas ne nur inter la homoj, sed ĝi ekzistas ankaŭ inter homoj-bestoj, kaj simple inter la bestoj. Teno de niaj domaj favoratoj pravas, kiom necesas la kontaktoj kun la aliaj rasanoj. Mia amikino rakontis, ke ili aĉetis ne raspuran hundeton – ja la homoj povas ami ankaŭ tian. Ĝi estis melhunda-rasmiksaĵo, kaj naskite ĝuste je nomtago Endre (Andreo), la ido ricevis la nomon Endike. Apud ĝin la familio akceptis saman rasmiksaĵan, sed vagabondan hundon, kiu ricevis la nomon Roksi, kaj ankaŭ nun vivas ĉe la familio. Familio de mia amikino loĝas en ĝardena familia domo, do ili alprenis ankaŭ strian katon. Kaj ĉar ĉi lasta tre maldika katino baldaŭ dikiĝis ĉe ili, la katino ricevis la nomon: Pufika (dika). La tri bestoj iĝis baldaŭ favoratoj de la familio. Endike estis la plej juna, plej gaja el inter la tri bestoj, li estiĝis la petolaĵojn faranto.”Dio kreis lin en sia bonhumuro”- karakterizis lin la mastrino. Sed dum 2010 la familio rimarkis, ke la hundo Endike perdis sian bonhumuron, dum la karesadoj rimarkeble dolorsentis en sia abdomeno. La diagnozo de la veterinaro – laŭ kiu; korpo de Endike plenplenas per kancer-tumoroj – ege malgajiga estis por ili ĉiuj. Ili pridecidis fordormigon de Endike, ke ĝi ne suferu plu.



La bildoj montras la malsanan hundon - kovrita per kovrilo – kaj apud ĝi siajn geamikojn. La momenton de la adiaŭo, eternigis sinjoro Árpád Ballán.

SinJORINO Adri Pásztor

Semajno de Internacia Amikeco

Jam de pli ol 40 jaroj la E-komunumo festas dum la lasta plena semajno de februaro la Semajnon de Internacia Amikeco, kiu pasas sub la devizo “Amikeco trans limoj”. La ideo lanĉita de Erik Carlén, sveda E-aktivulo, i.a. plurjara vicprezidanto de UEA celis doni la okazon al esperantistoj tra la mondo organiziĝi por plifortigi la reciprokajn kontaktojn kaj senton de komuneco kun ĉiu, eĉ plej fore kaj izolite loĝanta esperantisto. Dum jardekoj okaze de la Semajno cirkulis poŝtkartaj salutoj inter E-kluboj kaj individuaj esperantistoj kaj la Semajno mem estis la okazo por solenaj klubvesperoj. En la epoko de la Interreto oni ne plu amaskvante uzas tradiciajn poŝtkartojn kun la slogano de la Semajno kaj du interpremiĝantaj manoj, sed en la elektronika epoko senprobleme ĝi povas aperi en blogoj, TTT-paĝoj, retmesaĝoj. Cetere cele ne nur esperantistojn, sed ankaŭ neesperantistajn amikojn.

La Semajno ĉiam pli ofte estas la okazo festi ne sole en la propra esperantista medio. De kelka tempo por la solenaj klubkunvenoj oni invitas ofte reprezentantojn de naciaj malplimultoj, de enmigrintoj por praktike emfazi, ke amike interpremiĝantaj esperantistaj manoj superas limojn naciajn, rasajn, lingvajn, kulturajn, politikajn kaj religiajn.



Supre troviĝas la signo de la Semajno, kiun eblas facile elŝuti kaj utiligi. Krome vi povas legi la historian dokumenton, kiu estas la artikolo de Erik Carlén, aperintan en la oktobra numero de “Esperanto” en 1968. Ne ĉiuj ideoj de tiu lanĉa artikolo daŭre estas aktualaj, sed kelkaj ideoj povas esti plu inspiraj.

[/http://uea.org/informado/sia.html](http://uea.org/informado/sia.html) pri Facebook, Osmo Buller/

Anonco el Udmurtio

„Бронислав Чупин; 26. Februaro

Kara Adri! En Nacia Biblioteko de Udmurtio estas aranĝita Ekspozicio okaze de Semajno de Internacia Amikeco...- Bronislav Ĉupin”

La 8-a de Marto; Virina Tago en Hirosima

„Estimata kaj kara s-ino Adri, elkoran dankon pro via afabla kunlaboro por la internacia virina tago. Gesinjoroj Oshioka ĉiu jare laboras por tiu agado, utiligante Esperanton. Nun ili estas tre okupataj por traduki la mesaĝojn en la Japanan lingvon por ekspozicii la mesaĝojn alvenintajn de la tuta mondo.

Korajn salutojn ankaŭ al via edzo amike via: MURATA Kazuyo
<murata.kazujo@gmail.com>”



La 32-a TUTPOLLANDA ESPERANTO KONGRESO

okazos en Nowy Sącz de la 30-a de aprilo ĝis la 7-a de majo 2011.

La temoj estos: Civitana aktiveco de Esperantistoj,
la 105-a jubileo de estiĝo de la unua E-klubo en Nowy Sącz
105-a datreveno de naskiĝo de la revuo „Pola „Eesperantisto”,
55 jaroj de reaktiviĝo de E-movado en Nowy Sącz.

Aliĝu por partopreni la ĝuindan programon, ĉe:

Halina Komar<korlando@o2.pl>

Adri Pásztor

Saĝa diro

„Ne tio estas grava; kion vi havas, sed tio,

kio vi estas, kaj kio vi povas esti por la alia homo.”

/Albert Wass - La hungarlingvan tekston de Albert Wass, esperantigis László Pásztor/

Atenton!

La esperantistan infanprizorgejon Bona Espero en Brazilio incendio atakis en 2010. Iliaj oficialaj lingvoj estas: la portugala kaj Esperanto! Mi aŭdis, ke tie oni multe perdis. Se vi havas eblecon por sendi al ili helpmonon restarigi la pli fruan staton aŭ simple subteni ilin, bonvolu fari ankaŭ vi, sed pere de UEA. Pripensu: ne nur la plenkreskuloj, sed ĉefe la infanoj bezonas vian helpemon, amikecon. Agu laŭ via bontrovo, sed estu ĉiam antaŭ vi: ankaŭ la plej malmulto da mono gravas. Vidu leteron de la Bonesperanoj.

„Karaj geamikoj en Hungario, ĉiu ajn kunlaboro kaj financa helpo estas tre signifa por Bona Espero kiel konkreta signo de solidareco! Do, ankaŭ via donaco estas tre utila por aĉeti unu kaj duonan foston kaj 45 metrojn da dratoj. Sur la fotoj vi povas vidi kiel aspektas la laboro.

Jam ni konkludis kelkajn kilometrojn da bariloj sed mankas ankoraŭ pluraj. Ne pensu sendi monon rekte al Brazilo al la konto de la Instituto, ĉar la bankelspezoj estas tre altaj kaj tute ne kompenkus.

Bona Espero festis la Zamenhoftagon 15.12. 2010 per la inaŭguro de nia telecentro, t.e. dek komputiloj donacitaj de la banko kaj senpagan satelitan retkontakton! Nun ni povas eĉ pli bone prepari niajn infanojn al futura profesia vivo. Ili estas tre entuziasmaj!

Korajn salutojn kaj denove dankon,

La Bonesperanoj - Bona Espero lernejobonaespero@gmail.com”

Adri Pásztor



La bildoj alvenis de la Bonesperanoj el Brazilo, kaj de Jan Josef Pospíšil
<ingjanpospasil@gmail.com>

2011 estas Jaro de Leporo, laŭ la ĉina horoskopoj



<http://lysa.honlapepito.hu/?modul=oldal&tartalom=1142666>

En numero 2011 estas du numeroj 1. Ĉi tio signas, ke rolo de la individuo dum nia vivo kreskiĝos. En la taroko la 11-a karto estas karto de la Forto, la magiisto, kiu apud la aliaj kartoj estas unu el la plej forta karto. Tio donas forton al la taskoj kaj simbolas ankaŭ kuraĝon.

En la ĉinia astrologio la jaro 2011 estos jaro de la agoj kaj kiel ankaŭ jaro de la leporo, taŭgos por prizorgi, krei sekurecon kaj estigi negocon. / la ĉinia horoskopoj de tempo al tempo mencias anstataŭ jaro de leporo ĉi tiun periodon kiel jaro de kato. /

En jaro de la leporo naskita homo estas ĝenerale amikema, kara, artema, atentema, ĝentila, fidinda, bonvola, pro tio tiun amas multe da homoj. Tiu havas multe da amikoj, sed tamen por tiu la familio estas la plej grava. Tiu ŝatas prizorgi aliulojn. Kelkfoje tiu decidas malfacile, ĉefe pri gravaj demandoj, kvankam provas montri sin forta. Tio ne improvizas, por tiu la sekureco estas grava antaŭ ĉio. Pro tio tiu povas ŝanĝi ion malfacile. Tiu estas sentema, kelkfoje ofendiĝema. Tiu, havante ŝanĝeman animstaton kaj humoron, kelkfoje estas gaja, kelkfoje apatia, sen ĉiuj kaŭzoj. Tiu toleras malfacile la kritikon kaj malvenkon. Pro tio tiu volas eviti la malvenkon kaj plie retiriĝas antaŭ la defioj... oni povas legi en Google.

/Hungarlingva tekston de Adri Pásztor, esperantigis László Pásztor/

Niaj birdo-gastoj

Mia kara amuziĝo estas ekde mia infanaĝo observado kaj manĝigo de la birdoj dum vintroj. En nia ĝardeno, kien de aŭtuno ĝis printempo ne nur la paseroj kaj turdoj, sed ankaŭ la paruoj, rubekoloj, emberizoj, ruĝvostuloj venas, spite de tio, ke tiuj timas de niaj katoj. Sed tiuj ne damaĝiĝas, ĉar al la drato fortigita birdmanĝujo estas alte super la tero, pro tio la katoj ne atingas tiujn. La elmetitaj semoj, kruda pomo, dispecegitaj sekigitaj pomoj kaj la sebo estas bongusta nutraĵo ĉar sur la glaci- kaj neĝkovrita tero birdoj ne povas trovi, aŭ de sub la ŝeloj de arboj ne povas ili pinĉeti la raŭpojn, larvojn, kiuj estas bezonataj manĝaĵoj por tiuj. La paruoj rolas ankaŭ en nia hungara kanto, sed pri tiu temas ankaŭ du poemoj:

De Lőrinc Szabó: Nyitnikék /Printempigi devus/ ,

de Ferenc Móra: A cinege cipője /Ŝuoj de paruo/

La paruo ĝustadire estas resumanta nomo de specioj de kvar birdofamilioj. Ĉirkaŭ ni birdmanĝujo la granda paruo flugas kune kun la paseroj. Tiu estas ege eltrovema, same kiel la pasero, ĉar ankaŭ de la tero pinĉetas la defalintajn semojn, post la pluvo manĝas eliĝantajn tervermojn per sia beko distranĉante. Pro tio multe da danĝeroj minacas tiun. Surkape la birdeto estas nigra, sur la ventro maldika strio videblas. Cetere ties ventro estas bela helflava. Ties flugiloj estas grizaj, sur la flugiloj supre estas blujaj makuloj.

Ferenc Móra: Ŝuoj de la paruo

Pasante somero,
vent' malvarme blovas,
la granda paruo
malĝojegon havas...

La jaro 2011-a estas jaro de nia ĉe ni vintrumenta ŝatata birdo la; Granda paruo. Pri la Granda Paruo, vi povas vidi bildon kaj legi plie ĉe: http://eo.wikipedia.org/wiki/Granda_paruo

/Hungarlingvan tekston de Adri Pásztor esperantigis László Pásztor/

Kial estas avantaĝa superi la 45. jaraĝon?

1. La homrabistoj ne interesiĝas pri vi.
2. Kaze de ostaĝiĝo verŝajne oni liberigos vin unue.
3. Neniu rajtas pretendi de vi ien ajn forkuri.
4. Se iu telefonas al vi vespere je la 9-a, oni demandas: „Ĉu mi vekis vin?”
5. Oni jam ne opinias vin hipokondriulo.
6. Jam nenio ekzistas, kion vi devus pli malfacile alproprigi.
7. Viaj ĵus akiritajoj jam ne eluziĝas.
8. Vi povas vespermanĝi ankaŭ posttagmeze je la 4-a.
9. Vi povas vivi sen sekso, sed ne sen viaj okulvitroj.
10. Vi komplikiĝas en akrajn disputojn pri la pensio-sistemo.
11. Ne defion vi opinias pri la rapido-limigo.
12. Kiu ajn venas en la ĉambron, vi jam ne provas malaperigi vian barelventron.

13. En la lifto vi kune kantas kun la megafono.
 14. Viaj okuloj jam ne plimalboniĝos.
 15. La pagita sumo al Medicina Asekur-agentejo fine estos profita.
 16. Viaj artikoj estas pli precizaj meteorologoj, ol la profesia veterprognozo.
 17. Viaj sekretoj estas sekure ĉe viaj geamikoj, ja ili jam ne rememoras tiujn.
 18. La nombroj de viaj cerboĉeloj fine malpliigis je manipulebla nivelo.
 19. Vi ne memoras kiu sendis ĉi tiun liston al vi.
 20. Okulfrapa estas al vi, ke ĉi tiu teksto havas grandan literdimension je la intereso de via komforto.
- Bonvolu plusendi ĉi tiun leteron al ĉiuj, kiujn vi rememoras!

/Sendis D-ino Helena Bikszádi / Esperantigis László Pásztor/

Enigmoj

Kiel fari lumon helpe de akvo? Oni devas lavi la fenestron.

Kie estas la sola ejo, kie la romantiko antaŭas la sekson? En la interpreta granda vortaro.

Du grandaj mensogoj de la viroj estas: Mi amas vin.

Vi mankas.

Meritas por rideti!

Iu bona homo mortas kaj atingas la Ĉielregnon. Dio iras persone al la pordego kaj eninvitas. Dume ili sidas sur la nuboj, Dio demandas lin:

- Ĉu vi estas malsata, mia amiko?
- Sed jes, mia Sinjoro, mi volonte manĝus ion.

Dio malfermas iun konservaĵon kaj donas al bona homo. Tiu, dume manĝadas la konservaĵon, rigardas al la Infero kaj vidas, ke en la Inferon atingantaj malbenitaj animoj manĝas rostitajn viandojn, kaviarojn kaj salmojn. Alitage Dio denove demandas lin:

- Ĉu vi ne estas malsata, mia amiko?

La bona homo denove jesas. Efike de tio li denove ricevas iun konservaĵon. En la Infero nun la menuo estas langusto, steko kaj ĉampano. Dume okazas ankaŭ triatage samaj, la bona homo jam estas malpacienca kaj demandas Dion:

- Mia Sinjoro, kial mi ricevas ĉiam konservaĵon, mi vivis ĉiam humile, neniam kulpis, dume la en Inferon atingintaj malbenitoj ricevas reĝan manĝaĵon?

Efike de tio Dio respondas balancante sian kapon:

- Vi scias, ĉi tie supre, en la Ĉielregno ne indas dungi kuiriston.....

László Pásztor

Muzika literatura vagado

La Viviga Animo Literatura Rondo Societo prezentis muzikan literaturan vagadon titolitan „Milopa nuanco de la vivo”, la 24-an de Februaro 2011-a, en ĉambrego Kondor en la Miŝkolca Galerio. Antaŭ la programo la pentroartistino Ágnes Máger; /kreanto premiita pri Muzo-premio/ faris prezenton de sia ekspozicio por la interesantoj. La promeso de literatura vagado allogis pli ol okdek homojn al la evento, kiun gvidis doktorino Krisztina Várhelyi, kaj partoprenis ĝin ankaŭ nia samideanino ĉefdoktorino Ilona Bikszádi. La entuziasma publika prezentaĵo de la amatoraj deklamartistoj kun muzikaj akompanoj de doktoro Robert Romhányi, la deklamo kaj kantoprezentoj de la du gasteartistoj igis vere altnivela la kunvenon. Dankon pro la invito.

Adri Pásztor

11 esperantistoj reprezentas UEA-n ĉe Unuiĝintaj Nacioj

Kadre de siaj oficialaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj UEA rajtas akrediti reprezentantojn ĉe la oficejoj de UN. Surbaze de la decido de la Estraro la Ĝenerala Direktoro liveris al la monda organizaĵo rajtigilojn por 11 reprezentantoj en la kalendara jaro 2011.

Ĉe la ĉefa sidejo de UN en Novjorko la ĉefreprezentanto de UEA estas Humphrey Tonkin. Aldonaj reprezenantoj estas Neil Blonstein, Thomas Eccardt kaj Scott Page. Blonstein krome laboras kiel volontulo en la Novjorka Oficejo de UEA. En Vieno la ĉefreprezentanto de la Asocio estas Hans Michael Maitzen, dum Gregor Hinker kaj Stella Maitzen estas aldonaj reprezentantoj. La estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj Stefano Keller estas la ĉefreprezentanto en la UN-oficejo en Ĝenevo, asistata de Charmian Common, Nicole Margot kaj Francesco Reale. /Gazetaraj Komunikoj de UEA – HEA/

Funebroj

La aĝdojenjo de Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo **D-rino Károlyné Nanovfszky, Klára Hollóssy Filep** forpasis en sia 98-jara aĝo, la 21-an de decembro, 2010.

Ŝi estis instruistino pri geografio kaj biontologio. Ŝi esperantiĝis en la jaro 1950. Krom Esperanto ŝi konis la germanan, francan kaj latinan lingvojn. Esperanton ŝi lernis ĉe Julio Baghy, Alfonzo Pechan kaj Pavel Rosa. Dum pluraj jaroj ŝi gvidis esperantajn lingvokursojn en budapeŝtaj mezlernejoj: Varga Katalin, Ladislao la I-a, Alternativa Ekonomia Fakmezlernejo, en la lernejo de strato Szív, kaj por klubanoj en la Ĉefurba Hospitalo László. Ŝi partoprenis Esperantajn Pedagogiajn Kongresojn, kaj tiel, kiel fremdulgvidantino konatigis eksterlandajn grupojn kun Hungario. Klára estis tre aktiva membro de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo ekde la jaro 1978. Ankaŭ tie ŝi riĉigis per valoraj prelegoj la natursciencajn konojn de la klubanoj.

Dum plurjaraj malsanoj de Klárika ĉirkaŭis kaj flegis ŝin kun profunda zorgemo kaj amo la familio. Larĝa rondo de amikaro kaj honorantoj staris apud ŝi. Karega Klarinjo ni tre dankas pro Via amikeco. Vian memoron ni gardos en nia koro.

Kun beno de Dio ripozu en paco. En la nomo de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo adiaŭas

doktorino Julianna Farkas kaj doktoro Ludoviko Molnár

Estraro de HEA, kaj geedzoj Pásztor same esprimis sian kondolencon al la familio.



Laŭ informoj de s-ro József Eszényi, ni informas legataron de nia retrevuo NHI, ke samideano **László Balázs (1954-2011)** forpasis. Lia hejmurbo Szolnok estis, li laboris en urbo Szolnok ĉe la Hungaraj Ŝtataj Fervojoj, kiel financafaka oficiro. László Balázs esperantiĝis iam en la 1970-aj jaroj. De la 1980-aj jaroj li ekkomencis instrui Esperanton kaj estis estro de la esperanto grupo de urbo Szolnok. Poste translokoĝis Budapeŝton, kie dum iom da tempo

direktis la oficejon de HEA kaj subtenis sin per instruo de la Internacia lingvo Esperanto. Li estis entombigita la 17-an de februaro 2011-a. Li esperantigis romanojn de hungara verkisto Jenő Rejtő. La esperantigitaj verkoj estas: <http://www.freeweb.hu/verkoj/>:

1. Fred la Malpura, la kapitano
2. La antaŭenŝovita garnizono
3. La blonda ciklono
4. La dekkvar karata aŭtomobilo
5. La mortido
6. La nevidebla legio
7. La perdiĝinta krosŝipo
8. La retroviĝinta krosŝipo
9. La skeleta brigado 9/b
10. La ŝtelita kuriero
11. La tri korpogardistoj en Afriko
12. Patrolo en Saharo
13. Marŝi aŭ morti
14. Sub kvaranteno la Grand-Hotelo
15. Lutz van Dick: Malbenita forta amo
16. Attila ERŐSS: Vortico Web: www.designweb.hu
17. Fred la Malpura intervenas
18. Kiu interŝanĝis vivon
19. Papaveto la temerarulo
20. La Flava Garnizono
21. Sinjoro Vanek en Parizo 21/b
22. Bill Teksaso la temerarulo
23. La Nigra Kapitano
24. Pariza fronto
25. Reen en la inferon

26. La defraŭdita kasisto

27. Sinjoro eĉ en la infero restas sinjoro

28. Malbenita bordo.

Ni renkontis lin foje. Li estis tre simpatia, multflanka, bonega esperantisto. Estu li diobenata, ripozu pace.

Geedzoj Pásztor



Rerigardo al la pasintjara Zamenhofa Tago

La literatura konkurso de Jekaterinburga Esperanto Rondo donis al mi la ideon verki leteron al nia Majstro, kvazaŭ mi estus vivinta en lia epoko, kaj ne li en la mia. Do, naskiĝis la sekvaj du leteroj, kiujn mi prezentis dum nia Z-taga rememoro en Miskolc, kie ni geedzoj Pásztor rememoris ankaŭ pri libro de Proverbaro Esperanta - verkita de Zamenhof, ricevita el heredaĵo de nia forpasinta prezidanto Barnabo Batta, kiu ankoraŭ en 2009 festis kune kun ni la feston de kreinto de nia internacia lingvo. La etlonga, minimume 20 minuta subĉiela (en minus 5 C grada malvarmo) festo pasis en tre bona etoso, komenciĝinte post la /per disko/ finaŭskultitaj sonoj de Esperanto Himno. László Pásztor laŭtleĝis la Zamenhof-leteron. D-ro Jozefo Halász - adiaŭe kisante, brakume nin la aliajn kvin partoprenantojn – esprimis sian kordeziron: renkontiĝu ni same ankaŭ sekvajare, nur iom pli da homo venu. kaj en nia retrevuo mi publiku la enhavon de ĉi Z-letero kaj la atingitan rezulton dum la Z-taga konkurso. (Ĉeestis: Jozefo Gulyás el urbo Ózd, el Miskolc: d-ro Jozefo Halász, geedzoj Parkánszki kaj geedzoj Pásztor) Nian kunan feston traefikis la ĝojsentoj de aparteno unu al alia, kaj la proksimiĝanta Kristnasko. Ni respondis: Estu tiel, tiel estu!

S-ino Adri Pásztor

Jen, pri la retpaĝo de la Ural-a Esperanto-Klubo, vi povas sekvi la konkursantojn kaj la konkursaĵojn.

Pri la rezultoj: - <http://www.ural-sib.org/eo/pri-zamenhof-konkursoj-en-jekaterinburg>

Pri la fotokonkurso: - <http://www.ural-sib.org/eo/konkursoj/fotokonkurso-zamenhof-kaj-mi/fotokonkurso-zamenhof-kaj-mi>

Pri la konkurso de leteroj: - <http://www.ural-sib.org/eo/konkursoj/konkurso-letero-al-ludoviko-zamenhof/konkurso-letero-al-ludoviko-zamenhof>

(Bv. viziti la paĝojn, kaj lasi vian mesaĝon en la rubriko "komentoj"!)

Amike: Raja kaj Viktor Kudrjavcev organizintoj)

Letero al d-ro L. L. Zamenhof

La leteron al d-ro L.L.Zamenhof verkitan de mi, dume mi sendis al d-ro Endre Dudich, kiel kristnaskan donacon. Post kelkaj tagoj, venis letero verkita de d-ro Endre Dudich per ebla respondo de Zamenhof. Vidu, legu ĝin.

Adrienne Pásztor

Transtempa respondletero de L.L. Zamenhof al la gedzoj Pásztor

Estimataj gesamideanoj el Hungarujo!

Mi petas vian afablan pardonon pro la „malŝanca” okazintaĵo ke dum via tempovizito al Varsovio vi ne sukcesis interparoli kun mi. Mia kara edzino preferis ne ĝeni mian kutiman posttagmezan dormet-adon, kiun mia jam ne tre solida sanstato sendube bezonas. Tion vi certe komprenos.

Mi tion speciale bedaŭras eĉ pro du kialoj.

Unue, ĉar mi kun ĝojo kaj intereso akceptus vin, fidelajn adeptojn de la Lingvo Internacia.

Due, ĉar dormante min turmentis terura koŝmaro.

Mi ne povas kontraŭstari al la tento: mi rakontos pri ĝi al vi.

En tremiga malvarmo kaj timiga malhelo pasis antaŭ mia tria, spirita okulo scenoj de la morna estonteco de la homaro.

*Anstataŭ unu komuna dua lingvo, tuta aro da „helplingvoj” (Ido, Occidental, Novial, Interlingva, Romanid, Interglossa, Solresol, Ceqli, ktp), kiuj estas, kune kun Esperanto, forbalaitaj de la tutglobe triumfanta angla.

- *Anstataŭ evolucio, revolucio.
- *Anstataŭ hilelismo, hitlerismo.
- *Anstataŭ homaranismo, komunismo.
- *Anstataŭ libereco, teroro.
- *Anstataŭ egaleco, privilegiteco.
- *Anstataŭ frateco, genocido.
- *Anstataŭ scienco, supersticaro.
- *Anstataŭ Edeno, infero sur Tero.
- *Anstataŭ tutmonda paco, milito eĉ inter la astroj.

Min konsolas nur la certeco, ke tiujn teruraĵojn mi ne ĝisvivis. Estas pli bone tiel. Do, tiel estu.

Ne forgesu: tio ne estas profetaĵo. Ĝi estas nur sensenca sonĝo de eble tro sentoplana maljunulo.

Gardu la flamon...kaj eble vi sukcesos eviti tiun sorton.

L.L.Zamenhof

Danko

Pro partopreno de la supre menciita Zamenhof-konkurso mi ricevis elegantan diplomon, libron krom aliaj donacetoj. Mi dankas ilin kaj al la organizantoj, kaj al la klubanoj en urbo Jekaterinburg. Ili surprizis kaj kortuŝis min. Sur la fotoj vi povas rigardi la donacojn. Fotis: sino Adri Pásztor

Sinjorino Adrienne Pásztor



El nia leterkesto

Ukrajno

Oleh ĈORNOHUZ

Oleh ĈORNOHUZ, (en ukraina Чорногуз Олег Федорович, naskiĝis la 15-an de aprilo 1936 en vilaĝo Ivaniv, Vinica provinco) - renoma ukraina verkisto, ĵurnalisto, dram-verkisto, redaktoro de revuoj "Perec", "Vus", aŭtoro de multnombraj romanoj, noveloj, rakontoj, artikoloj.

Studento-kursanto (1956-1958) de Armea Altlernejo en Ĉernivco; diplomiĝis pri ĵurnalistiko (1964) en Kijiva Universitato. Laboris en redakcejoj de multaj gazetoj, direktoro (1983-1986) de la kijiva eldonejo "Radjanskij pis'mennik", ĉefredaktoro de tutukrainia humuraĵ-revuo "Perec" (eldonkvanto - pli ol 3 milionoj da ekz.).

Membro de la Nacia Ĵurnalista Asocio de Ukrainio (de 1960), de la Nacia Verkista Asocio de Ukrainio (de 1963), ĝia sekretario (1988-2004), prezidiano. Kunfondinto de la Tutmonda Forumo de Ukrainoj (1992), delegito de 39-a sesio de Ĝenerala Asembleo de UN (1984).

Merita Arta Aganto de Ukrainio (1996), laŭreato de literaturaj premioj nome de Ostap Viŝnja, de Ivan Bahrjanij, de Olesj Honĉar, de Voskobijnik-familio; ŝtata ordeno de Jaroslavo la Saĝa (2006), ordeno-kruco de Ivan Mazepa (2010).

Romanoj

- "Aristokrato el Vapnjarko" (Аристократ із Вапнярки, 1979);
- "Pretendentoj por Kolonel-ĉaro" (Претенденти на папаху, 1983);
- "Babilono sur Hudsono" (Вавілон на Гудзоні, 1985);
- "Mi strebas al maro" (Я хочу до моря, 1989);
- "Donacoj de pigmeoj" (Дари пігмеїв, 2005);
- "Kapricoj de l' sorto" (Примхи долі, 2006);
- "Vivanto kun morto" (Той, що живе зі смертю, 2006);
- "La ora skarabo" (Золотий скарабей, 2007);
- "La marĉo de Remez" (Ремезове болото, 2007);
- "Resurektinto el mortintoj" (Воскреслий із мертвих, 2009);
- "Mono de ĉielo" (Гроші з неба, 2010)

La verkoj estis tradukitaj en 22 lingvojn. Fragmenton de Babelo sur Hudzono ("Paco", 1986, 2), de Mono de ĉielo kaj kelkajn artikolojn esperantigis

Viktor Pajuk

Oleh ĈORNOHUZ

La Mono De Ĉielo

(fragmentoj)

...Mi eĉ ekĝojis, ke tiel neatendinte mi renkontis Tod-on. Pri tio mi revis dum kelkaj jaroj. Dum pli ol tri. Mi centelcente garantias – pli ol tri. Kaj, finfine, li estis kaptita de mi tute hazarde. Mia ŝatata kaj kara TOD. Almenaŭ nome tiujn ĉi tri majuskulajn literojn mi tralegis sur la numerplado de lia “Bentley”. Sed, eble, de mia “Bentley”? Plej verŝajne – de mia. Nun mi rememoras tiun bildon de nia renkotiĝo en detaloj. Mi kvazaŭ gustumis ĝin. Gustumis, ĉar ĉio renoviĝis en mia memoro kaj la kapo ne doloris. Kvankam, sentoj... Mi sentis, ke barelingoj ĝis nun estas sur la kapo... Sur la kapo ili tiel restis. Kiu povus fari tion? Kiu? Mi vidis ankaŭ buŝtukon... Odorantan, dispremitan kiel pleŭronekto, buŝtukon. Sed eble, mi songis tion. Aŭ tio aperis vizie. Mi ne scias.

Tamen, ni revenu al Todo. Tiu ĉi estas ankaŭ interesa individuo. Ne malpli interesa, ol Kudrik. Mi tiel revenas al komenco de la renkotiĝo. Al komenco de la renkotiĝo kun Todo. Sur krutmonto. Kaj jam post tio ĉi mi ekmemoros. Asocie.

– Finfine, – ekĝojis mi, forviŝante post Todo la vangon, kiun li ĵus salivigis al mi. – Kiam vi ja redonos la ŝuldon?.. Vi promesis ankaŭ interezon... (uzuro)

– Vi ne ekkredos, – Tod ĉirkaŭbrakumis mian talion. Li simple ne povis atingi miajn ŝultrojn. – Vi ne ekkredos...

– Mi ne ekkredos, – diris mi, ne flankenigante la rigardon. Mi rigardis lin kaj ial mi estis certa, ke nun en lia kapo intense laboras ruliloj. Kiel ofte okazas kun Kudrik. Li volas ion mensoge diri al mi. Sed ekpensi ion tiom konvinkan. Tion, por konvinki min. Tion, en kio mi kredus kaj ankaŭ konsolos lin. Mi ekdecidis averti lin. Kaj iom mallongigi programon de serĉado en lia kapo. Transformatigi, kiel ŝatis eldiri Kudrik.

– Nur ne diru al mi, ke vi ĵus forlasis malsanulejon, kie via vica parenco estas preskaŭ morta, aŭ vi iras de funebro de via fratino aŭ frato. Al mi mankas mono por aĉeti florkronojn al ĉiuj.

– Mi ja ne diras... Ĉu vi aŭdas, mi ja ne diras, – balbutis Tod... Fakte, li nomiĝis Teodoro, sed ĉiuj rabuloj... Nu, ĉi tiuj ŝarkoj de entreprenado, mi rimarkis, ŝatas kurtigitajn nomojn. Eble pro tiu, ke ili mem plej ofte estis kurtuloj. Kiel Tod. Lia kapo estis almenaŭ videbla aliflanke de kapoto. Se fari unu ŝtupon malantaŭe kaj rigarfi lin en perspektivo kaj ne vidi korpon de Todo, oni povas pensi, ke tie iu ensabligis lin ĝis talio.

Finfine li elturniĝis:

– Ĉu vi vidis ĉi krutan monton?

– Mi staras sur ĝi.

– Kaj ĉu vi scias, kiom da mi pagis pro ĝi?

– Mi ne volas scii... Vi ja pagas regule vian krediton al banko, ĉu? Kial vi pensas, ke ĝustatempe redoni al mi mian monon, ankaŭ kun interezo, estas granda peko por vi?.. Por kio vi tiom da krucoj kaj ikonoj pendigis sur vi kaj en via aŭto? Via “Bentley” kiel movebla preĝejo. Ĉu vi en ĝi preĝe forklinas pekojn viajn? Mi volas aĉeti de vi tiun ĉi krutmonton. Kune kun via Malseka Kokino, – mi direktis la fingron al Ĥovraŝok, kiu lokigis sian dorson al suno kaj ĝi aktive sekiĝis elvaporante.

– Mi ne vendos, mi ne vendos, Georg... Donu al mi kelkajn semajnojn... Prokrastigu...

– Post du semajnoj mi eĉ ne demandos vin. Post tri semajnoj mi enterigos vin sur la monto. Vivantan. Vivantan! Se la monsumo ne kuŝos sur la tablo de Kudrik, mi forprenos kaj Dnipron, kaj krutmonton*... – mi sidis en “Maybach” kaj ordonis al Makso turniĝi.

En la retrospegulo reflektiĝis figureto de Tod’. Tute malgranda. Min asocie eĉ kaptis la penso, ke Tod’ estas ĉefkomandanto de iu eta armeo, konsistanta el pigmeoj. Same tiel mi pensis. Kaj li kun la armeo verdiktos min. Per mortpuno. Tiel al mi sugestis Tiu. Tiu, vivanta en mi. Aŭ Li de tempo al tempo venadis al mi. Eble, venis. Mi ne sciis tion ĝuste. Mi ne sciis, ĉar mi ne memoras, kiel Li tie ekloĝadis. Kiel Li nerimarkeble enrampis. Trarampis en min. Li trarampis kaj ie tie sidis. Eble, eĉ sur la fundo de mia animo.

Mi veturis kaj silentis. Mi ekmemoris tiun Todon. Tiam Kudrik diris:

– Konatiĝu – Teodoro. Unika individuo...

Li same tiel diris: “Individuo”.

“Kiu individueco famigis vin?” – mi volus tiam demandi Kudrik-on, sed, bedaŭrinde, mi ne sukcesis. Reale – mi bedaŭras.

Teodoro – Tod’... Li havis iun plantan familnomon... Mi eĉ ne memoras, same kiun... Mi scias, ke de tiu biologia gento, “kie oni ĝin semos, tie ĝi ekkreskos”. Sed nun mi ne volis pensi pri tio. Mi pensis pri alio. Dum la drinkado, kiam li ne trinkis la unuan glaseton kaj mi demandis “kial?”, li figrimacis. Li tiel figrimacis, ke mi ekkompatis lin. Mi pensis, ke li tuj-jene fordonos finaĵojn**. Pli ĝuste – la animon al Dio.

– Koro, – mallaŭte diris Teodoro. – La koro doloregas... Kaj senprokraste mi devas iri al Baden-Baden... Sed la tuta monsumo estis investita...

– Kiom da? – mi fintrinkis ankoraŭ unu glaseton, la varmo flue okupis mian korpon.

– Ho, ne! Multe da. Kaj mi ne kuraĝus... Vi ja vidas min la unuan fojon.

– Sed, ne la lastan?

– Ne lastan. Kompreneble, ne lastan fojon. Mi bezonas nur por du semajnoj. Ĝuste – por du semajnoj. – Tod’ elpoŝigis plastikan karteton. Ĝi estis kalendareto. – Akurate ĝis merkredo... La sepdekan tagon, je la kvina posttagmeze, ĉe la sama tablo mi redonos al vi... Kun uzuro.

– Por kio tiu akurateco?

– Mi volas, ke vi ekvidu, ke antaŭ vi sidas la homo de la honor-vorto. Mi kisas la krucon. – Todo eligis de-sub sia adampomo, abunde kovrita per densa hararo, oran kruceton kaj trifoje kisis ĝin en mia ĉeesto.

Poste li demetis nigran, kvazaŭ monaka, ĉemizon. Teodoro nudigis la bruston. Teodoro fieris pri sia brusto. Li similis al nigra konstelacio, konsistanta el senescepte nigraj steloj. Inter ili pasis steloj ruĝaj. Tio estis eksterordinara, tatuoj... La steloj viciĝis, kiel sur kiraso de superpeza tanko. “Gladiatoro” aŭ bolŝevista tanko sub kodita nomo “Moloĥ”***. La steloj, kiel punktolinioj, strie kovris duonon de Teodora brusto. Ili kuris triline: de la umbiliko ĝis la cico sur la maldekstra brustoflanko.

– Kio ĝi estas? – mi kapkline demandis lin pri la signoj sur la ventro, ripoj kaj dorso, kiam li turnis al mi vizaĝe.

– Zono de Teodoro, – fiere respondis li.

– Kaj pri kio ĝi signifas?

– Ĉiu nigra stelo kun ruĝa substreko – fremda edzino, nur nigra – vidvino, ruĝ-blua – ne edziniĝinta, ruĝa kun nigra – vidvino...

– Kaj simple ruĝa aŭ rozkolora? – ĝustigis mi.

– Virgulino, – Teodoro elstarigis la bruston.

– Tra dornoj – al astroj?

– Kiam vi redonos la ŝuldon?

– Baze...

– Tri tagoj, – mi interrompis lin kaj enaŭtiĝis.

– Makso, – kiam ni atingis ŝoseon. – Ordonu al Mur’, antaŭ la stela serpento, kiu trifoje ĉirkaŭas lian bruston, pentri al li kobran kapon. Kun eliĝinta langeto. Se li ne redonos la monon – Mur’ dronigu lin. Sen Mongolo. Oni ne bezonas superfluaĵajn atestantojn, – mi diris tion kaj ne ekkonis min mem. Kio okazis kun mi? De kie tiuj metamorfozoj de mia animo? Ĉu de la mono de ĉielo? Kaj ĉu la mono estas DE ĉielo? Sed ankaŭ ĝi ne estas la mia.

Makso ion ĝustigis. Mi malatentis kaj simple aldonis:

– Dronigu kontraŭ la “privata propraĵo” de Teodoro. En akvokirilo, sub la plej alta krutmonto. Nomu ĝin – Teodora monto. Inter homoj devas resti iu memoro pri ĉi tiu idioto. Memoro kaj legendo. Almenaŭ iu. Kaj sur la krutmonto devas loĝi lia animo...

Esperantigis Araneo

* “Kaj Dnipron, kaj krutmonton...” – aludo al poemo-“Testamento” de renoma ukraina poeto Taras Ŝevĉenko (1814-1861)

** fordoni finaĵojn = forpasi, morti

*** Moloĥ – (Biblia) antikva Semida dio (caro)

Viktor Pajuk

Ĉehujo

Ĉestmír Vidman + Jaroslav Krolupper **Odo pri SKOKOVY**

Ni jam konas ĉeĥojn kaj moravianojn
Estis tie tamen multe pli da gentoj
Rememoru ni modestajn skokovanojn
Jen paŝtigas tie da ĉevaloj centoj

Ĝoje ja ĉi tie ĉiuj pulmoj spiras
en aero freŝa de la Paradizo
Tien ĉi kondukas ankaŭ Lakta Vojo
Kaj turistoj tie pri ripozo, ĝojo
ĉiam antaŭĝojas, pensas eĉ sopiras

En la pensiono – Espero nomiĝas –
ĉiuj certe trinki povas kaj varmiĝas
ne nur per satiga kaj abunda manĝo
sed eĉ pri specifa de parol‘ aranĝo

Homojn el la mondo eblas tie vidi
Unu lingvo ĉiujn firme tie ligas
kaj mastikas
Ĉiu tie povas lerni eĉ ekridi
Ĉiu povas alrapidi
al la lingvoparadizo

Tie ĉi kunvenas ĉiuj aŭ kosmanoj
aŭ marsanoj, venusanoj
jupiteranoj, saturnanoj
ĉiuj foraj galaksianoj

Kaj ĉiuj laŭdas
(ĉiuj, kiuj rigardas, aŭdas)
bonhumoron kaj gastigon
de ĉi tiu domo.

Oni devas ja ankoraŭ fini
la observatorion

Mi salutas karajn ĉielanojn
kaj kun nostalgio
ankaŭ skokovanojn

En la nomo de teranoj
Ĉestmír VidmanIO
(Ne gravas
oni povas
kaŝi tiun IO
Finiĝas la folIO
relegu ĉION
ree dekomence)

/La poemon sendis: Jindřiška Drahotová, kiu skribis:

” Kara amikino Adri,

Mi sendas poemon de poetoj el Asocio de handikapitaj esperantistoj, kiuj regule por unu semajno kunvenas en pensiono Espero en vilaĝeto Skokovy. Ĉestmír Vidman kaj Jaroslav Krolupper dediĉis la odon al mi, al la organizanto de la kunvenoj..!”



Hungarujo

Bibliografio de periodaĵoj

14.143 periodaĵoj aperis en la unuaj 120 jaroj de Esperanto. Fine vi trovos ilin en la dikega bibliografio de HMM, Budapest 2010. HMM, tio estas Luis M. Hernández Yzal, la fondinto de la Hispana Esperanto-Muzeo en Katalunio, la hungaro Árpád Máthé kaj la katalunino Ana Maria Molera. La "libreto" havas la formaton 305 x 215 x 70 mm, ampleksas fierajn, dense presitajn 1175 paĝojn kaj pezas ĉ. tri kilogramojn. Malfacilas por legado en bankuvo! Bibliotekoj, sciencistoj kaj esploristoj atendas ĝin jam de jaroj - volumo 1 de la vivo-verko de d-ro Árpád Máthé: "Bibliografio de periodaĵoj en aŭ pri Esperanto". Kiam kaj kie ĝi estos akireblaj por la publiko ne jam estas konata. Tre probable ĝi estos sufiĉe kosta por privatuloj. Sed tiel estas. Vi tamen povos helpi disvastigi ĝin: Petu universitatan, nacian aŭ sciencan bibliotekojn, ke ili havigu ĝin por vi. Dankegon al niaj diligentaj pioniroj!

Sanon, feliĉon, optimismon al ĉiuj esperantistoj deziras: László Szilvási

Italio

Studo pri maldikigo de Esperantaj Vortaroj

Tiu artikolo de la korea akademiano Ma Youg-tae estas nun legebla rete en:

http://www.bonalingvo.org/index.php/Studo_pri_maldikigo_de_Esperantaj_Vortaroj

Bonvolu informi pri ĝi en viaj medioj.

Renato Corsetti / Re: (la bona teksto)

Hindujo

Saĝdiroj de Mahatmo Gandhi

„La pardono estas virto de la grandanimuloj, la malgrandanimuloj neniam pardonas.”

„Ŝajnas esti pli malfacila venki la nevideblajn pasiojn, ol konkeri perarmile la videblan mondon.”

„Unue en vi mem vi devas krei la ŝanĝiĝon, kion vi postulas de la mondo.”


Esperantigis Adri Pásztor

Mahatmo Gandhi

Akrostiko

(Evandro Caboclo)

Martiro ja plej granda,
Animo plena je lumo,
Humila en siaj agoj
Afable instruis la veron
Tiel same kiel Jesuo
Misiulo de la Kristo
Admirinda oratoro,
Genio je servo de l' paco.
Agante altruiste,
Neŭtralis la malamon.
Dia homo el la steloj,
Hodiaŭ ĉiela loĝanto,
Illuminita saĝulo.



Hungaraj historiaj datrevenoj en 2011

Antaŭ 1015 jaroj, en 996 regnestro Géza edzigis sian filon, Stefanon kun Gizella, filino de Henrik, bavara princo. Samtempe rezignis pri la aŭstra konkerita tereno de Hungaroj trans la rivero Lajta

Antaŭ 1010 jaroj, la 1-an de januaro 1001, oni kronis regnestron Stefano al reĝo inter kadroj de eklezia ceremonio. En tiu jaro oni fondis episkopejon en Esztergom.

Antaŭ 980 jaroj, en 1031, reĝo Stefano preparis siajn admonojn por sia filo, princo Imre.

Antaŭ 920 jaroj, en 1091, reĝo (László) Ladislao la 1-a, la Sankta, venkis ĉe Orsova la al Transilvanio atakintajn Rumanojn.

Antaŭ 800 jaroj, en 1211, nia reĝo Andreo la 2-a loĝigis la Germanan Ordenon de Kavaliro en Transilvanion. Ĝia tasko estis por defendadi kontraŭ la Kumanoj kaj por konverti tiujn laŭ la kristana kredo.

/ www.info-system.hu/nagykun.../Kisuj_kalen_45_140_oldalig.pdf / El la Vikipeidia artikolo:
Hungaraj historiaj datrevenoj - kompilis kaj esperantigis László Pásztor/



Printempo – pentraĵo de d-ro Ferenc Földi

30/2010. Patrujon konigaj Broŝuroj: Esperanto kaj urbo Nagykanizsa : Recenzo:

Dum Kristnasko mi decidis tiel, ke mian ĝojon, kion kaŭzis al mi la kiel donacoj ricevitaj libroj, mi rakontas al vi. Nun mi rakontos pri du libroj. Ambaŭ alvenis de urbo Nagykanizsa. Tibor J.Szabadi, mia verkistamiko ege surprizis min. Ĉar tempe de Kristnasko estis malmulte da tempo por legi pro la festaj antaŭprepariĝoj, unue la pli maldikan eldonaĵon mi studis. Ĉi tiu plaĉaspekta, per blazono de Nagykanizsa ornamita eldonaĵo estas la 30-a eldonaĵo de la patrujon konigaj broŝuroj. Ĝi prepariĝis pere de subteno de Urbestro de Nagykanizsa kaj Urban Defendanta Societo. Unue ni povas legi en ĝi hungarlingvan antaŭparolon de D-ro Georgo Horváth, poste saman en Esperanto laŭ traduko de Tibor J. Szabadi. Poste pensoj de la aŭtoro malfermiĝas antaŭ niaj okuloj. Ni povas legi pri multaj okazintaĵoj de esperanta lingvodisvastiga historio de Nagykanizsa, de 1905 ĝis nun, same hungarlingve. Ĉi tiu broŝuro havas historie signifan kulturperantan rolon, pritemas pri naskiĝo de la esperanta lingvo, pri kreinto de Esperanto, pri apero de la unua libro kaj pri la unuaj pioniroj de Nagykanizsa. Sur bildoj de la eldonaĵo aperas antaŭ ni: D-ro Zamenhof, kreinto de Esperanto, la unuaj lingvon disvastigintoj de Nagykanizsa, dokumentoj kaj raportoj pri agadoj de Esperanto-kluboj, plue la de geesperantistoj de Nagykanizsa menditaj leteron fermantaj markoj, bildkartoj, /nature iliaj bildoj./ Sur ĉi tiuj videblas famaĵoj de la urbo kaj meze de ili flava litero „E” en verda esperanta kvinpinta stelo, kiel simbolo de Esperanto-movado. Bonfamon, nomon de Nagykanizsa pligrandigis plenrajte la ĉeesto de Esperanto kaj ĝiaj du sukcesaj aranĝaĵoj: la 1978. jara Junulara Esperato-Renkontiĝo /JER/ kaj la 2001.jara SAT-kongreso. La „Verda stelo” Esperanto-klubo estas rekonata elemento de kultura vivo de Nagykanizsa. Ĉe fino de la eldonaĵo ni trovas liston de unua parto de verkoj de Tibor J. Szabadi. Mi scias, ke ege malfacila estas por kompili ĉi tian historian rememoraĵon. Pro tio mi gratulas al la aŭtoro de la broŝuro, Tibor J.Szabadi. kaj al liaj helpantoj. Mi esperas, ke baldaŭ mi povas legi ankaŭ esperante, sed ne nur mi, sed ankaŭ tiuj, kiuj interesiĝas pri la bela lingvo kaj ĝia historio de Nagykanizsa. Ĉi tiun tekston indas esperantigi ankaŭ pro tio, ke estu konservita ne nur la de Hungara Esperanto-Asocio, sed ankaŭ de la Esperanto-Muzeo, eternigite por la generacioj de la estonto.

La alia donaco portas titolon „Ars-bildo” kaj estas esence la 11. Antologio de Nagykanizsa, eldonite estas en 2010. Ankaŭ tiu ĉi estas plaĉaspekta. Sur la dika paperkovrilo konturiĝas iu portreto el la sur arĝentgriza bazo nigraj literaj skribaĵfragmentoj. La libron Suzana Farkas ilustris. La volumo naskiĝis pere de subteno de 42 aŭtoroj. Tiu antologio havas 179 paĝojn kaj ĝiajn gvidprincipojn certigas: Liriko kaj liro, Virino-petalo, Junaj ventoj, Je memoro de Ludoviko Király, Niaj urbo regionoj domoj, Ars-tradukoj, Portreto-eseoj.

El inter la en volumo aperintaj poemoj plaĉis al mi poemo de Enikő Czifány: Unu tago de amo /la aŭtorino pensadis pri la Kristnasko/. Sed plaĉis al mi ankaŭ multe da prozaĵoj. Mi mencias kelkajn:

Elizabeta Bucsák: Milito, aŭ paco.

Ildikó M.Kovács: Kaŝ-starante

Ludoviko Király: Kanizsa, urbo de la studjaroj, je memoro de Tibor Tüskés

Tibor J.Szabadi: Ars-tradukoj el Esperanto, de la izlanda Þórbergur Þórdarson: Letero al la nazioj.

Ĉi tiuj tradukoj havas grandan esprimkapablon, interesan vidmanieron kaj elstaras el inter la aliaj.

Mi gratulas al aŭtoroj de la antologio kaj deziras pluan bonan elanon, kreivon kaj multe da sukcesoj. Ambaŭ eldonaĵoj estas interesaj, utilaj, instruivaj legaĵoj.



Tibor Szabadi, kun la de li verkitaj libroj



NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.uw.hu>